

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3/2011



Foto: Wikipedia (M. Passinen)



*Rapidfluo "Kukkolankoski" en la Tornio-rivero, 14 km norde de Tornio. Vidaĵo al Svedio.
– Pri Aŭtunaj Tagoj de EAF en Tornio–Haparanda–Pajala, p. 12.*

Postkatastrofa seminario en Sapporo, p. 4

Esperantisti vaihto-oppilaaksi, s. 6 ♦ Edzinportado, p. 15

Bazaro de eblecoj, p. 15 ♦ Mitkä ovat kotimaisia kieliä? s. 20

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*

Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ✉ robog@gmx.de

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 044 3933 924 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Jukka Nikoskelainen, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 ✉ juknik@utu.fi

Markus Sunela, Kalevan puistotie 16 B 23, 33500 Tampere. ☎ 040 768 5165 ✉ markus.sunela@iki.fi

Keith (Keke) Uber, Poutapolku 3 B 30, 02110 Espoo. ☎ 040 413 4252 ✉ keith_uber@yahoo.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori. ✉ robog@gmx.de

Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Sampo 800017-230825).

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Sampo 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avooinna tiistaisin klo 17-19.

☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>



Malfacile fondi registaron

En la verka tempo pasis sep semajnoj post la elekto de la parlamento de Finnlando, kaj tri semajnoj post komenco de intertraktado por

formi novan respublikan registaron. Tiuj intertraktadoj finiĝis en senelirejo. La prezidanto de la plej granda parlamenta partio (la konservativa) laŭ la konstitucio gvidis intertraktadon de ses partioj (el ok, du proprainiciate restigis sin en opozicio) pri agadprogramo de fondota registaro. Konsento pri ĉefaj naciekonomiaj linioj ne estiĝis. La plej granda malakordo estis pri relativa gradigo de impostoj laŭ enspeza nivelo. Kion unuj trovas justa, aliaj ne povas aprobi.

Kiam aperis nia antaŭa numero (2/2011), ni jam sciis la rezulton de la baloto. Tiu estis la plej granda ŝanĝo depost 1945. Tiam la duono el la parlamentanoj estis novaj, nun 84 el 200. La cirkonstancoj estis ja tute diferencaj. La baloto antaŭ tiu de 1945 estis en 1939. La mandato de tiu parlamento estis pro la milito dufoje pli-longigita per escepta leĝo. Indas tamen menciigi, ke en marto 1945 la milita stato ankoraŭ daŭris pro la Laponia milito por forigi la germanan eksaliancanan armeon. Finnlando estas la sola Eŭropa lando, kie okazis liberaj parlamentaj elektoj ankoraŭ dum la mondmilito.

La granda ŝanĝo en la postmilita parlamento estas facile komprenebla. Kiom liberaj la elektoj estis, dependas de tiama starpunkto kaj historia vidpunkto. Finiĝis la 27-jara eksterleĝeco de la komunistoj, kaj eksterleĝigita estis partio nomanta sin Patriota popola movado. Ĝin la soveta-brita-usona kontrolkomisiono de la militon gajninta alianco difinis faŝisma. Estis ankaŭ malebligita kandidatigo de kelkaj ĉefaj dummi-

litaj politikistoj.

Ne estas plu de-eksteraj limigoj. Ne ekzistas ekstera aŭtoritato malebliganta al iu ajn havi publikan rolon en la socia vivo. Ni ankaŭ ne vivas en stato post perdita milito, en kiu la sola perspektivo estas konservi la pacon kaj rekonstrui. Ĉu tamen estas io simila? Ke homoj sentas, ke perdis ion, aŭ ke io estis forprenita? Sendube. Ĉiam estas malkontento pri propra stato. La materia produktado multe kreskis, dum ĝia divido inter civitanoj fariĝis ĉiam pli malegala. Oni amase spertas maljustecon kaj sentas malfidon al politikistoj.

Tia malfido ebligis la grandan balotan sukceson de la partio, kiu nomas sin finne Bazaj aŭ Regulaj, sed alilingve Veraj (tiel!) Finnoj. Perdis ĉiuj aliaj, kaj ĝi fariĝis la tria laŭ nombro de parlamentanoj (39). Preskaŭ ĉiuj el ili estas novuloj, sed pli atentinda estas la multtendenceco de tiu parlamenta grupo. Oni ne vane komparis ĝian surprize rapidan ekkreskon kun la tiel nomata teo-regala movado en Usono; protesto pli konfuza, nebula, ol analiza. Estas ankaŭ similecoj kun "popolaj movadoj" en meza kaj okcidenta Eŭropo, kiuj havas fortajn nacionalismajn tendencojn. Sekve, inter la novaj parlamentanoj troviĝas opinioj de normala demokrateco ĝis akra rasismo kaj vulgara kaj "intelekta". – La tuta grupo tamen "kritikas enmigradon kaj multkulturecon, pledas nacian unuecon". La ŝtatan finna-svedan dulingvecon ĝi volas fini.

La "Veraj" restis ekster la traktado pri registara programo kaj sekve de la registaro mem, ĉar la kerno en ilia balota kampanjo estis malaprobi la helpon de Eŭropa Unio al Portugalio kaj aliaj landoj en financa krizo. Partopreni en tia registaro unufoje detruus fidon ĉe voĉdonin- ▷

Neforgesebla seminario en Sapporo

La tutan jarkomencan mi planis vojaĝon al Japanio printempe, kiam floras la sakura-ĉerizarboj tie. En februaro la plano estis fiksita kaj al la vizito apartenis i.a. Esperanto-Seminario en Sapporo. Atilio sugestis, ke ankaŭ mi partoprenu la seminarion, kien li estis invitita instrui. Kompreneble mi konsentis, estus ja bele vidi iom pli de la lando.

La 11-an de marto ĉio kolapsis. La tertremo kun la giganta cunamo detruis miajn vojaĝplanojn, sed tiam la plej granda zorgo koncernis la amikojn, esperantistojn kaj ĉiujn aliajn, kiuj estis trafitaj. Tamen, feliĉe por mi la situacio trankviliĝis en la sekvaj semajnoj, kvankam estis anoncigitaj preskaŭ ĉiutage katastrofoj en la nukleaj centraloj. Kiam alproksimiĝis pasko, mi povis denove komenci plani la vojaĝon kaj ĝi realiĝis laŭplane.

La 44-a Esperanto-Seminario en Sapporo okazis la 3an–5an de majo. Kiam Atilio kaj mi atingis la flughavenon de la urbo, mi tuj sentis ke temis pli norda loko: la vento estis malvarmega, eĉ frosta. Survoje el la flughaveno al la stacidomo, mi povis konstati ke mankis ankorau folioj el la arboj, inter kiuj estis tre multe da betuloj. Sed la tago mallumiĝis jam je la 19a horo, ĉe ni ĝi ja jam en majo estas kelkajn horojn pli longa.

La seminariejo estis Junulara Centro de Hokajdo, sed temis pri tre komfortaj kondiĉoj. En mia ĉambro troviĝis banejo kun bankuvo, kiuj ŝajne, male ĉe ni, kutimas en Japanio. En mia uzo estis ankaŭ jukata, la vespera jako, kaj pantofloj, kiuj ĉe ni estas nur en altkvalitaj hoteloj. Ankaŭ la manĝoj bongustis, kvankam multaj el ili estis novaj por mi. Eĉ kafo estis facile haveb-



Seminariaj partoprenantoj: entute ĉeestis 3 kursogvidantoj kaj 25 kursanoj, kiuj dividiĝis en 4 klasoj. Kelkaj eĉ faris ekzamenojn.

la en koridoraj aŭtomatoj.

La seminario tre plaĉis al mi. Mi devas admiri la diligentecon de la japanoj: temis pri intensiva tri-taga studado de alventago ĝis foriro. Mia grupo nomiĝis memstara klaso kaj ni diskutis pri diversaj temoj. Estis bonege, ke kelkaj klasanoj preparis temojn kaj enkondukis nin al ili. Miaj parolvicoj kompreneble tre ofte enhavis informojn kaj sciojn el Finnlando, kaj ni povis konstati, ke multaj aferoj similas inter niaj popoloj, kvankam ili situas tiel fore de unu la alia. Ekzemple, kaj al japanoj kaj al finnoj la lernado de Esperanto postulas apartan intencon, ĉar ni tre malmulte havas helpon de la gepatra lingvo. Sed nin en Finnlando helpas la kono de najbaraj kutimoj kaj manieroj. En la grupo estis s-inoj Tiekō Isikawa, Masayo Isino kaj Yuka Kawai, kiuj ankaŭ estis la bonaj kaj efikaj organizantoj de la seminario. Krome kunestis s-ino Masako Tahira kaj s-roj Syuiti Yamakawa kaj Ryotaro Kobashi. Dankon al ĉiuj pri multflankaj, afablaj kaj viglaj diskuthoroj de la klaso.

Dum t.n. fakkunsidoj estis du prelegetoj: unue mi parolis pri Finnlando kaj pri Esperantaj eventoj tie kaj poste Atilio pri korpa komunikado. Por komencantoj ambaŭ prelegetoj estis afable kaj lerte interpretitaj de s-ro Yamakawa. Mi rakontis pri nia lando, kiu estas granda kun malmulte da homoj, pri la naturo kun sennok-

taj noktoj, pri historio, turismo ktp. La aŭskultantoj povis gustumi finnan sekalan panon kaj glicirizon (salmiakki), kiujn ja ni finlandanoj sopiras eksterlande. Fine ili povis provi kanti la kanton "Riti rati ralla".

La prelegeto de Atilio pri nia ne ĉiam konscia korpa komunikado estis kaj informativa kaj amuza. Li donis ankaŭ multajn praktikajn ekzemplojn kaj mi rajtis estis helpanto en kelkaj. Evidentiĝis, ke en alproksimiĝo kun fremdaj homoj japanoj kaj finnoj kelkfoje havas similajn manierojn.

La vetero iomete beliĝis, sed ne varmiĝis, kiam ni forlasis la seminariejon por denove veturi aŭtobuse al la flughaveno de Sapporo. La urbo ŝajnis esti grandega kaj moderna, kaj ĝin ĉirkaŭas montegoj. La famaj sportejoj ne videblis, ili certe situas ekster la urbocentro.

Mi estas dankema al Atilio, kiu proponis al mi la seminarion. Estis tre afable paroli kun multaj homoj kaj aŭdi iliajn spertojn pri diversaj aferoj, kvankam nun ja la plej aktualaj estis la teruraj spertoj de la naturkatastrofoj.

Kaj la sakura-ĉerizarboj? Ilin mi maltrafis: en la sudo ili jam finfloris kaj en Sapporo ankoraŭ ne komenciĝis. Bona kialo iam reveni al Japanio, ĉu ne?

Tiina Oittinen

▷ (de la prezidanto)

toj, kies plej granda komuna tendenco evidente estis EU-kritikemo. Sed la malnova, nun provizora, registaro jam voĉdonigis la aferon pri Portugalio en la parlamento, ĝi estis aprobita per plimulto, kaj for de tagordo.

Nun, en la komencaj tagoj de junio, ni scias, ke nova provo formi registaron plej evidente komenciĝos kun la "Veraj", la senprecedenca gajninto, kaj la Centra partio gvidinta la respublikan registaron ok jarojn, nun la plej granda

perdinto en la baloto. Tiuj anstataŭ la socialdemokratoj kaj Maldekstra alianco, kies sociekonomiaj postuloj estis malakceptitaj de la plej granda, konservativa, grupo.

Povas esti, ke en venonta Finnlanda registaro agos ministroj, kies ideoj pri internacia vivo kaj enlanda lingvopolitiko havas trajtojn al ni fremdajn.

Tuomo Grundström

On muukalaismyönteisyyden aika: haastamme suomalaiset esperanton harrastajat mukaan!

Vaihto-oppilas- ja kansainvälisyyskasvatusjärjestö Suomen Youth For Understanding ry (YFU) on käynnistänyt Suuren Muukalaismyönteisyyskampanjan keväällä 2011. Kampanja on vastaus maabrändityöryhmän *Tehtävä Suomelle* -raporttiin. Työryhmä antoi suomalaisille perheille tehtäväksi majoittaa ulkomainen vaihto-oppilas.

Nyt puhutaan maahanmuuttoa isommasta asiasta. Nyt puhutaan asenteesta. Se ilmenee suhtautumisena erilaisuuteen kunnioittavasti ja uteliaasti. Se on irtisanoutumista ennakkoluuloista, stereotyyppioista ja rasismista. YFU uskoo, että suomalaiset ovat pohjimmiltaan muukalaismyönteisiä.



Rohkene isäntäperheeksi – ota esperantoa osaava muukalainen kotiisi

Suomalaiset ovat majoittaneet koteihinsa YFU:n ulkomaisia vaihto-oppilaita jo vuodesta 1958. Järjestön kautta Suomeen tulee vuosittain vajaan sata ulkomaista lukioikäistä vaihto-oppilasta.

Saksalainen **Rebekka** on aktiivinen esperanton harrastaja. Hän käy perheensä kanssa vuosittain kansainvälisissä esperanto-tapaamisissa ja on opiskellut kieltä 11 vuotta. Myös jousiammunta, manga-sarjakuvien kirjoittaminen ja piirtäminen sekä ylipäänsä kirjoittaminen kuuluvat 16-vuotiaan Rebekkan rakkaimpiin harrastuksiin. Lisäksi hän tykkää käydä uimassa ja tehdä lyhytvideoita. Rebekka kuuluu myös eläintensuojelujärjestöön. Harrastusten lisäksi Rebekka kertoo nauttivansa perheen kanssa vietetystä ajasta. Rebekka saapuu Suomeen elokuussa ja odottaa vielä jännityksellä kuulevansa lisätietoja suomalaisesta isäntäperheestään.

Ota haaste vastaan ja auta meitä täyttämään ulkomaisen nuoren unelmaa!

Nyt maahamme tulossa olevat nuoret ovat valinneet ykköskohdemaakseen juuri Suomen – monille kaukaisen, kiinnostavan ja eksoottisen. Kun suomalaisperhe avaa ovensa ulkomaiselle vaihto-oppilaalle, saavat he vuorostaan tutustua toiseen kulttuuriin. Samalla koko perhe ja lähipiiri saavat uuden ystävän, ja parhaimmillaan jopa elinikäisen ihmissuhteen.

Lisätietoja isäntäperhetoiminnasta saat soittamalla YFU:n toimistolle (09) 6226 130 tai verkkosivuiltamme www.yfu.fi.

Marika Antikainen
ohjelmapäällikkö
Suomen Youth For Understanding ry

Instruista trejnado ĉe edukado.net

En la porinstruista paĝaro www.edukado.net, funkciigata de ESF, komence de aprilo estis lanĉita **Reta Instruista Trejnado ĉe edukado.net** (RITE). En la projekto kunlaboras inter aliaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kaj instruistoj de la esperantologia fakto de Universitato Adam Mickiewicz en Poznan-Pollando.

La kursaro celas ebligi akiron de fakaj konoj kaj praktiko pri instruado de Esperanto, kompletigataj de kulturaj kaj gramatikaj konoj. La ĉefa celgrupo estas klubgvidantoj, instruantoj aŭ instruemuloj, kiuj ne havas eblon partopreni ĉeestan trejnadon aŭ volas profundigi siajn sci-ojn kaj akiri novajn spertojn.

Studi en RITE ĉiu povas laŭ siaj ritmo kaj ebloj, en ajna periodo de la jaro. La antaŭvidita mezuma studtempo de kursano, je okazo de kelkaj studhoroj ĉiusemajne, estas proksimume unu jaro.

La privatan kurson kreis, financis kaj estras d-rino Katalin Kováts, ĉefo de la entrepreno EduKati.

La kursaro konsistas el 100 unuoj, kiuj organiziĝas sub 7 studblokoj. La materialojn ellaboris por metodiko Katalin Kováts (Nederlando), literaturo Baldur Ragnarsson (Islando), literaturo Tomasz Chmielik (Pollando), interlingvistiko Věra Barandovská-Frank (Germanio), gramatiko Ilona Koutny (Pollando) kaj frazeologio Sabine Fiedler (Germanio). Kiel prelegantoj de la bloko Liberaj Studoj partoprenas ankaŭ Renato Corsetti, Anna Löwenstein, Stefan MacGill,

Detlev Blanke, Wera Blanke, Nicola Minnaja, Mauro Nervi, Martin Markarian, Dennis Keefe kaj aliaj.

Eble estas interese mencii, ke la prelegoj de la studbloko Liberaj Studoj iom post iom estos spekteblaj ankaŭ al la nekursanoj. Tiuj formas la unuajn erojn de la kleriga sekcio de la retejo, kie estos kolektataj filmitaj aŭ sonregistritaj prelegoj de konataj Esperantistoj, fakuloj pri iu speciala temo, rilata al edukado, instruado, lingvistiko, informado kaj aliaj.

La metodika parto havas 30 ŝtupojn kaj la teoriajn partojn kompletigas konsultiĝo, praktikaj ekzercoj kaj taskoj, adaptitaj al la bezonoj de la studentoj. La studoj finiĝas per ekzameno kaj provinstruado.

La kondiĉoj por partopreni en la studoj estas minimume B2-lingvonivelo pri Esperanto, aliro al la reto kaj pago de la laŭlande difinita partoprenkotizo. Baldaŭ ekfunkcios ankaŭ interna stipendifonduso kaj eblas peti subtenon ankaŭ ĉe ILEI.

Jam komencis siajn studojn kaj trapasis la unuajn testojn 6 personoj (el Belgio, Grekio, Nov-Kaledonio, Aŭstralio, Vjetnamio kaj Usono), atendas je enirintervjuo pliaj kvar personoj.

Interesiĝantoj pri RITE vizitu la paĝon ĉe www.edukado.net/rite aŭ skribu al rite@edukado.net.

*Katalin Kováts
direktoro de RITE*



Esperanto kaj vivo

Esperanto kaj vivo de **Vladimir Samodaj** estas nekutima verko. Temas pri memoraĵoj de viro, kies tuta vivo estas firme ligita kun la persistemo kaj la malfacilaĵoj de la Esperanto-movado en eksa Sovetunio.

Samodaj estas homo, por kiu Esperanto estas multe pli grava afero ol simple lingvo. Ĝia prospero kaj disfloro estis lia vivpasio – en kondiĉoj, kiam la ŝtato konsideris ĝin dubinda kaj suspektinda afero, multfoje eĉ mortige danĝera okupiĝo.

Amiko de Samodaj, Boris Kolker, karakterizas la aŭtoron “naivulo” – en la pozitiva senco de la vorto. Tion Samodaj sincere konfesas ankaŭ mem en sia libro. Eble tiu naiveco estis unu el liaj rimedoj transvivi en aliel neelteneblaj kondiĉoj.

Tiun naivecon bone ilustras lia sinteno al la komunista partio. En iu momento oni petis lin aliĝi al la partio. Li opiniis, ke kiel simpla homo li ne estas sufiĉe elstara por tia honoro kaj neis la proponon. Poste li spertis, ke por ricevi laborpostenon li bezonus partimembrecon. La deziritan postenon okupis alia homo, senskrupula fripono, sed pli merita ol li, ĉar tiu estis partiano. Tiam li akceptis aliĝi al la partio. Tamen la tempo ŝanĝiĝis, tro multaj intelektuloj fariĝis partianoj kaj nun oni preferis ordinarajn laboristojn. Li devis atendi jarojn antaŭ ol li sukcesis aliĝi.

Ankaŭ kelkaj aliaj epizodoj rakontas pri la sama sinteno. En la 70aj jaroj li dediĉis multe da energio por eldoni Esperanto-rubrikon kaj eĉ Esperanto-suplementon en la tiam populara gazeto *Moskvaj Novaĵoj* (profesie li estis tradukisto de la araba versio de tiu gazeto). Fine li sukcesis esperantigi kelkajn paroladojn de *Leonid Breĵnev* kaj la konstitucion de USSR. Tiutempan oficialan sintenon klare ilustras, ke li estis riproĉita pro distribuado de tiuj ene de



Sovetunio – tio ja estis misuzo de papero destinita por eksterlandanoj. Okcidentaj esperantistoj apenaŭ interesiĝis pri tiuj tedaj dokumentoj, sed por sovetaj esperantistoj eldono de iu ajn ŝtata dokumento estis grava atesto pri tio, ke la ŝtato finfine akceptas Esperanton.

Pri sukceso kaj malsukceso de sovetiaj esperantistoj bone rakontas la klopodoj krei oficialan, ŝtatagnoskitan organizon. En tiutempa Sovetunio ne povis ekzisti liberaj organizaĵoj ekster la ŝtata kontrolo. Tamen la ŝtato ne volis akcepti Esperanton kiel parton de iu agnoskita organizo. Ŝtataj aŭtoritatoj komprenis, ke esperantistoj estis sendanĝeraj naivuloj, sed samtempe – sen firma politika gvidado – ili povus esti facile influeblaj de eksterlandaj ideoj. Agadi en tia situacio povus esti danĝere. Tial la esperantistoj serĉis iun tegmentan organizon kaj fine sukcesis aniĝi en SSOD – ruslingva mallongigo de unuigo de sovetiaj amikecocietoj. Tiu “venko” estis maldolĉa. SSOD elektigis al la esperantistoj prezidanton, kiu eĉ ne komprenis la lingvon kaj sekretarion, kiu aktive sabotadis la agadon.

“Esperanto kaj vivo” estas iom nekohera kolekto de personaj vivspertoj kombinitaj kun oficialaj dokumentoj rilatantaj al la klopodoj stariĝi oficialan esperanto-organizon en Sovetunio. Tamen ĝi estas tre interesa kaj riĉenhava legaĵo. Por multaj nuntempaj esperantistoj, precipe en Okcidento, eĉ la faktoj estas grandparte nekonataj. Ĝi funkcias ankaŭ kiel persona fenestro al la funkciado de la sovetia ŝtataraparo el la vidpunkto de unu rado en la sistemo. La libro estas aĉetebla i.a. en la libroservo de UEA.

Sakari Kauppinen

Evoluo de la UEA-membraro

Aldone al la retaj rememorigoj, kiujn la Centra Oficejo faras de tempo al tempo, hieraŭ la CO dissendis paperan leteron al ĉiuj 1305 membroj de la jaroj 2010 kaj 2009, kiuj ne jam remembris ĉi-jare. Fakte la nombro estus ĉ. 1700, sed la revarbilo ne estis sendita al tiuj, kies kotizon pagis Fondaĵo Canuto, aŭ kiuj klare membris nur pro UK.

El la pasintjaraj membroj ĝis nun 1107 ne remembris. Samtempe aliĝis 598 novaj membroj. Kompare kun la definitiva membronombraro pasintjara (5288) la deficiito ĉi-momente do estas 509. Kompare kun la sama dato pasintjare ĝi estas 90. Krom al 1107 pasintjaraj membroj la varbilo iris al ducento da membroj en 2009, kiuj ne remembris poste.

Plej multe la membronombraro falis en Kubo, dum en la cetera mondo ĝi estas praktike tute sama. Fondaĵo Canuto pagis en 2010 "normalan" kotizon (MJ aŭ MA) por 45 kubanoj. Krome 111 kubaj kongresanoj estis membritaj en la kategorio Membro kun Gvidlibro. El ili 6 estas membroj ankaŭ ĉi-jare danke al amikoj el la UK. Multaj el la ceteraj 105 jam skribis al la CO pri sia deziro resti UEA-anoj. Ĉar MG por Kubo kostas 5 eŭrojn, la remembrigo de ĉiuj koston 525 eŭrojn. Mi do alvokas por donacoj al Fondaĵo Canuto, por ke kiel eble plej multaj kubanoj povu resti membroj de UEA – eĉ en

Julie al Kopenhago

Ĝis la 22a de majo al la ĉijara Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago (23.–30. julio) aliĝis 1329 personoj el 67 landoj. Kiel kutime, plej multaj kongresemuloj venas el Francio, Germanio kaj Japanio, dum el Finnlando aliĝis 24. Aliĝu, kiu ankoraŭ ne faris tion – certe indas viziti tiom proksiman mondkongreson en freŝe starigita kaj bone atingebla kongrescentro – ĉu per la kongresa karavano aŭ memstare.

Francio	-94	Kroatio	-11
Usono	-35	Meksiko	-11
Brazilo	-22	Svislando	-9
Belgio	-19	Finnlando	-8
Japanio	-19	Svedio	-7
Britio	-18	Norvegio	-6
Kanado	-18	Aŭstralio	-4
Nederlando	-16	Danio	-2
Pollando	-16	Nov-Zelando	-2
Germanio	-15	Slovenio	-2
Israelo	-15	Aŭstrio	-1
Hispanio	-15	Irlando	-1
Italio	-11		

pli alta kategorio, se eble. Al ĉiuj, kiuj akceptas mian alvokon, mi elkore dankas!

Ĉi-kune listo de la landoj, kiuj ankoraŭ ne atingis la definitivitan membronombron en 2010. La landoj, kie Fondaĵo Canuto ĉefe "kulpas" pri tio, estas ellasitaj.

Se iu suspektas, ke la minuso de la propra lando signifas, ke la peranto ne anoncis al la CO ĉiujn jam pagitajn kotizojn, bv. kontakti la peranton!

Osmo Buller

UK 2012 fiksita

La Kongresa Fakto de UEA fiksas la datojn de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu laŭ la pli frua decido de la Estraro de UEA okazos en la vjetnama ĉefurbo Hanojo. La 97-a UK disvolviĝos de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2012.

Ĉefa parto de la kongresa programo okazos en la hotelo Meliá, ejo de la inaŭguro kaj aliaj programeroj por la tuta kongresanaro estos la Palaco de Kulturo. Ĝi troviĝas en piedira proksimeco de la hoteloj, kiujn UEA ofertas al la kongresanoj.

Samtempe la 43-a Internacia Infana Kongreseto okazos en infanĝardeno, kies direktorino estas aktiva esperantisto.

UEA kunlaboras kun Infoterm

La 10-an de majo UEA membriĝis al Infoterm, la Internacia Informejo por Terminologio. Infoterm estis fondita en 1971 per kontrakto inter Unesko kaj la Aŭstra Normiga Instituto (ASI). Celoj estas i.a. informinterŝanĝo, projektoj, renkontiĝoj, eldonaĵoj ktp., ĉefe en la kampo de terminologio. Deveno de la organizaĵo estas la teminologia esplorcentro, kiun fondis kaj longepozorgis Eugen Wüster, esperantisto kaj fondinto de la moderna terminologia scienco.

Infoterm funkcias ankaŭ kiel sekretario de la Teknika Komitato TC37 de ISO (la Internacia Organizaĵo por Normigado), kun kiu UEA oficiale rilatas jam ekde 1991.

Interrilata respondeculo estas la nova UEA-komisiito **Mélanie Maradan** (hejmpaĝo: <http://home.etu.unige.ch/~maradam5/>) el Svislando.



Stano Marĉek plu redaktos

Pasintjare la Estraro de UEA daŭrigis la kontrakton kun Stano Marĉek pri redaktado de la revuo “Esperanto” ĝis la julia-aŭgusta numero 2011. La celo estis, ke ekde la septembra numero la nuna redaktoro daŭrigus sian laboron sub nova kontrakto. La Estraro tamen ĵus decidis daŭrigi la validecon de la nuna kontrakto, farita en 2003, ĝis la fino de la jarkolekto 2011.

La Estraro antaŭvidas proponi novan kontrakton al Marĉek post la Universala Kongreso en Kopenhago, kie oni verŝajne akceptos novan dokumenton pri la gvidlinioj pri la redaktado de la oficiala organo de la Asocio. Ĝia definitivigo dependas de la difino de la ĝenerala komunika politiko de UEA, pri kiu nun diskutas la Komisiono pri Strategiaĵ Demandoj. La komisiono

estis elektita pasintjare en Havano kaj laboras sub la gvido de Mark Fettes. En ĝi aperis interalie la ideo, ke la revuo havu plurajn volontulajn redaktorojn pri diversaj sektoroj de la movado sub la kunordigo de la ĉefa redaktoro. Ĉar mankas ankoraŭ klareco pri tiu kaj aliaj aspektoj de la redaktado, la Estraro decidis, ke la nuna redaktoro laboros laŭ la malnovaj kondiĉoj ĝis la lasta numero de la jarkolekto 2011.

laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

Lernu.net havas 100 000 uzantojn

Je la 29a de majo ĉe lernu! registriĝis la 100 000a uzanto. La teamo de lernu! kaj ĝia sponsoro ESF dankas al ĉiuj, kiuj uzis kaj uzas la retejon.

Tiuokaze lanĉiĝis nova konkurso kun kelkaj valoraj premioj – detaloj ĉe: <http://lernu.net/konkurso>

Aperis ankaŭ artikolo en Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/2011/cent-mil-uzantoj-en-la-retejo-lernu.net>

(lernu.net, Libera Folio)

Internacia Esperanto-Kinofestivalo en Brazilo

Kiel konate, rilate al kinoarto Esperanto postrestas jardekojn kaj vivas ĉefe en teksta mondo – kaj tiel ne montras sin al la ekstera mondo, kiun pli alkitimiĝis al videoj kaj filmoj.

Por rompi tiun staton Aleksander Osincev, membro de la rusia Esperanto-junularo kaj fondinto de retportalo pri esperantaj filmoj (origine kaj kun subtekstoj) – *filmoj.net*, starigis la unuan Esperanto-filmfestivalon. La festivalo okazos kadre de la kombinita kongresego en San-

Paŭlo (10a ĝis 13a de julio, dum la Tutamerika Kongreso, Brazila Kongreso kaj Kongreso de la brazila junularo).

Internacia ĵurio elektos inter filmoj de diversaj longecoj ekde 5-sekundaj, sed ankaŭ eblos spekti filmojn eksterkonkurse. Ankoraŭ eblas sendi kontribuojn – vidu la retejon *kinofestivalo.org*.

Hali Halinalle – solidareco kun Halina Gorecka

En la redakcia kolumno de la marta kajero de “La Ondo de Esperanto” kaj en la retejo “La Balta Ondo” aperis sciigo pri la tre malfacila situacio de Halina Gorecka, kiu pro la neceso atendi gravan operacion (grefto de reno) devas dum longa tempo vivi en Moskvo. Multaj esperantistoj el diversaj landoj tuj reagis per bondeziraj leteroj kaj telefonvokoj, per diskonigo de la redakcia mesaĝo, kaj per malavaraj mondonacoj.

La unua listo de la donacoj aperis en la ĵus presita junia kajero de “La Ondo de Esperanto”. Ĝi montras, ke ĝis la 5a de majo pli ol 50 esperantistoj donacis al la vivosava fonduso pli ol 17 mil eŭrojn. La donacoj plu venas.

Vidu la liston en la novaj-retejo “La Balta Ondo”: <http://sezonoj.ru/>

Koran dankon pro la donacoj kaj pro la konsolaj kaj sandeziraj mesaĝoj, kiuj kortuŝas kaj esperigas nin!

AIKo

Nova retejo por komencantoj

Facila Vento estas nova retejo kun facilaj tekstoj por komencantoj. Vizitu ĝin ĉe:

<http://facila.org/>

Emilio Cid (tra "Amikema")

Karavano al Kopenhago BK5 certiĝis

21.7.–31.7.2011 (UK 23.–30.7.)

La karavano al Kopenhago realiĝos kun 20 partoprenantoj. La itinero estas planita tiel, ke al Kopenhago ni veturos laŭ la orienta marbordo de Svedio kaj vizitos en la urbo Kalmar. Tranokto en Malmö. Reen la karavano startos sabate matene kaj tranokto okazos proksime al Stokholmo. Tiel eblos reenveturo dimanĉe per la taga ŝipo. Ankoraŭ eblas informiĝi pri partoprenado ĉe la kontaktuloj Tiina Oittinen (sekretario de EAF) kaj Päivi Saarinen (vicprezidanto) – sed rapide.

Karavaani BK5 Kööpenhaminaan varmistui

Karavaanimatka toteutuu, mukaan tulee 20 osallistujaa. Ruotsin reitti kulkee menomatalla itärannikkoa, jossa pysähdytään mm. Kalmarin kaupungissa. Yöpyminen Malmössä ja Kööpenhaminaan matkataan pitkin Juutinrauman siltaa. Paluumatka toista reittiä siten että illalla ollaan lähellä Tukholmaa. Sunnuntaina matkustamme päiväläivällä Tukholmasta Turkuun. Voit vielä kysellä yhteyshenkilöiltä (Tiina Oittinen, Päivi Saarinen) mahdollisuutta osallistua matkalle, mutta toimi nopeasti.

Eventokalendaro de EAF

- 12.–17.6. Esperantokurso en Popola instituto de Valamo
- 2.7. Eukonkanto (porti virinon) -festivalo en Sonkajärvi
- 23.–30.7. UK en Kopenhago, karavano el Finnlando
- 10.–11.9. Aŭtunaj Tagoj de EAF en norda Finnlando (Tornio/Haparanda)

Aŭtunaj Tagoj en Tornio–Haparanda–Pajala Syyspäivät pohjoisessa 10.–11.9.2011

Lapin lumo – Laponia lumo

